EKO 2022 Esperiga Komuniko

Subtene al la regiona, landa kaj loka agado

UEA ilei IF EF

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbeglo Koffi, Elda Doerfler

**ENHAVO n-ro 40>** • Eo-Tagoj • Balta FLAM • ILEI • Kongresa Libro **< julio 27**

## Esperanto-Tago: akiru la afiŝojn

Por la preferantoj de la paco, esprimante tion per pozitivaj vortoj, koloroj, ne miksita kun militaĵoj, ja temas pri la *Tago de Esperanto* (kaj tio memkompreneble inkluzivas porpacajn klopodojn). Tiaj afiŝoj jam ekzistas en pluraj lingvoj:vidu kaj elŝutu tie: http://www.linguistic-rights.org/esperanto-tago/esperanto-tago-2022.html

Stefano Keller

La afiŝoj (kiujn ni delonge vidigis en EKO) aperis en la lingvoj: albana, angla, araba, armena, bulgara, cina, dana, esperanto, evea, finlanda, franca, germana, gvarania, hispana, hungara, indonezia, irlanda, itala, japana, korea, kurda, nederlanda, persa, pola, portugala, rusa, serba, slovaka, slovena, suahila, sveda, taja, ukraina, vjetnama.

Inform-arigo: Renato Corsetti kaj SMG

## Madagaskara radio denove podkastas

En ĉi tiu ELSENDO N°122 estas la lasta podkasto ĉar ankaŭ ni iom ripozos dum aŭgusto. Lanumero komenciĝas per demando farita de la redaktoro pri la vera celo de Zamenhof kiam li kreis Esperanton. Li instigas ĉiujn reagi al liaj analizoj. Krome, ni proponas al vi la duan parton de nia artikolo pri la malagasa totemo *Aloalo*. Ni daŭrigas la temon pri *taxi-brousse* koncerne la inicon al la malagasa lingvo. Kaj kompreneble, ni ne forgesis enmeti en la podkaston belegan Esperanto-kanton el Afriko! Ni bondeziras al vi ĉiuj agrablan feriadon kaj bonan aŭskultadon!

https://youtu.be/HHIBbZ0TmHU

Henriel FIDILALAO, lot IAG 27 B Antoetra
MG 102 AMBOHIDRAPETO, +261 (0)32 53 035 93
Skajpo: belafino; WeChat ID: henriel2018; Whatsapp: +261325303593

## Kolektistoj kolektas siajn fortojn

Bert Boon: Numismatiko: ne plu kaŝita trezorujo de la Esperanto-kulturo (2)

https://esfconnected.org/2022/07/18/numismatiko-2/

# Gravaj atingoj el AMO 87 pri Baltio

## AMO 87 FLAMO-analizo

**Okazis en la dua tago de AMO 87 en Klajpeda, Litovio, en la 15a de julio, 2022. La analizo ankaŭ alkroĉita.**

### FORTOJ de la balta movado

Baltiaj Esperanto-Tagoj – dividata inter la tri ŝtatoj.

Bonaj rilatoj kun instancoj.

Litova Asocio havas sidejon en Kaunas.

Pluraj lokaj grupoj tra Litovio: interalie en Klajpeda, Saŭlij, Vilno, Kaunas.

Multa uzo de delegado – precipe por BET 56.

Alta proporcio de esperantistoj kompare kun la suma popolo – eble mondrekordaj.

### .LAMAĴOJ de la balta movado

Malsufiĉa profundeco de talento en Latvio kaj Estonio.

Grandaĝa popolo – kiel ĝenerale tra la Eŭropa movado.

Malsufiĉaj homoj kun teknikaj kapabloj.

Ne ĉiu havas komputilon kaj aliron al la reto.

Malforto de la aktiveco de fakaj asocioj tra Baltio.

### .AVANTAĜOJ por la balta movado

Ne tiom vasta uzo de la angla, precipe inter nejunaj baltianoj.

Varieco en la mondo kun multaj kulturoj –Eo povas malfermi pordojn al tio, kun alterna-tivaj valoroj ol tiuj alireblaj per aliaj lingvoj.

Riĉa kolekto de najbaraj landaj asocioj – ankaŭ fortaj kiel Germanio.

### MINACOJ por la balta movado

Ĉiam pli vasta uzo de la angla inter junuloj.

Malfacileco preni kontakton kun la kulturoj de la mondo, kiujn Eo teorie proponas.

Malmulta aliro al financaj rimedoj, precipe en Latvio kaj Estonio.

Rezisto al subvenci-petado.

Malfacilecoj komuniki la avantaĝojn de rego de fremdaj lingvoj, kaj precipe de Esperanto.

### FLAMO: La Historio

(vidu la FLAM-analizojn en <aktivulo.net> sub <Aliaj projektoj>)

Junio 2014 Pri la movado en Bulgario (farita ekster la kadro de AMO).

FLAM 2: Aŭgusto 2014: Pri la movado en Italio kaj en Eŭropo (kadre de AMO 5)
FLAM 3: Oktobro 2015: Pri la funkciado de Kulturcentro Greziljono (kadre de AMO 15)
FLAM 4: Decembro 2015 Pri la movado en Sudorienta Eŭropo (kadre de AMO 17)
FLAM 5: Aprilo 2016, Pri la movado en Danlando kaj Skandinavio (kadre de AMO 24)
FLAM 6: Oktobro 2017, por sudazia movada sparkigo (kadre de la 4a SAS kaj AMO 39)
FLAM 7 : Oktobro 2018 pri la ukraina movado (en Lviv kadre de AMO 52)
FLAM 8: Novembro 2019 en Rumanio kun konsiloj por landa agado (kadre de AMO 59)
FLAM 9: Julio 2022 en Litovio en la balta movado (kadre de AMO 87)

## Burunda progreso

La landa asocio estas demokrata: ni organizas balotadon post kvin jaroj por elekti novajn respondeculojn. La organizo de ANEB estas jenaj: En la kapo estas La prezidanto de la landa asocio, post e la vic prezidanto, kasisto, vic-kasisto kaj sekretario.

ANEB havas sekciojn:

A. Organo kiu zorgas pri instruado: BIS (Burunda Instruada Sekcio. (Tie estas respondeculo, vic respondeculo kaj sekretario)
B. Organo kiu zorgas pri junularo: JEBUO ( Junularaj Esperantistoj Burunda Organizo) - tie estas respondeculo, vic-respondeculo kaj sekretario)
C. ANEB havas instruistojn en la tuta lando kiuj zorgas pri instruado. Tiuj instruistoj raportas al respondeculo kiu zorgas pri instruadoj en BIS.
D. ANEB havas membrojn kiuj aliĝis al UEA. Estas komitatano A en UEA.
E. ANEB havas sian propran Centron, kie estas oficejo, ĉambro por vizitantoj, biblioteko kaj ĉambro kie estas televido.
F. ANEB malfermis la infanĝardenon por okupi la Centro kaj helpi la komunumon. Ni instruas la Esperantan lingvon en la infanĝrdeno por semi la lingvon en la kapoj de infanoj kiam ili estas junaj.

## ILEI raportas pri la lastaj tri monatoj

Raportas la Prezidanto kaj la Estraro de ILEI pri la trimonata agado, de 2022-04-15 ĝis 2022-07-15. EKO prezentas koncizigitan version. La tuto aperas en la retejo de ILEI.

**Kongreso-2022**

Maje estis decidite, ke por la 3-a sinsekvan jaron la ILEI-Kongreso okazos virtuale, ĉi-jare ekde la 23-30 de julio kun la nomo VEKI-3 (la 3-a Virtuala Esperanto-Kongreso de ILEI) kaj la sama temo "**ESPERANTO EN DULINGVA KAJ PLURLINGVA EDUKADO"**. Kadre de VEKI-3 okazos ankaŭ ILEI-Simpozio virtuala. Senpaga aliĝilo troviĝas ĉe: https://forms.gle/BcFUQPyxrF8Hpnr4A

Dume survojas grandega preparlaboro por VEKI-3. La ĝisnunan programon de la evento eblas vidi ĉe: https://www.espero.ir/eo/veki-3/. La ĉefaj organizantoj de la eventoj estas Laura Brazzabeni pri la tuta kongreso kaj Fernando Pita pri la Simpozio. Dum VEKI-3 okazos la Koimitatkunsido, ankaŭ elekto de la Elekta Komisiono ĉi-jare. Estas preparataj bezonataj materialoj por la Komitatkunsido. La Estraro klopodas pri diversaj organizaj aferoj. Okazos ankaŭ AMO-seminario kadre de VEKI-3.

**ILEI-Kongreso-2023**

La Estraro traktas pri la sekvonta ILEI-Kongreso, okazonta en bela mara loko en Italio.

**ILEI-Simpozioj 2020-2021 (en VEKI-1 kaj VEKI-2)**

La estrarano Fernando Pita kompilas la Simpozian Libron pri VEKI-1-2020 kaj VEKI-2-2021. Ĝi nomiĝos “Aktoj de ILEI-Simpozioj” kaj havas jam ĉirkaŭ 200 paĝonj. La Estraro strebas prezenti ĝin dum la Simpozio kadre de VEKI-3.

**La Estraro kaj Komitato**

Daŭras regulaj estrarkunsidoj. Dum la pasintaj 3 monatoj jam okazis 4 plenaj retaj kunsidoj. La ĉefaj temoj estas la kongreso VEKI-3, la Simpozio, preparado al la ĉefa jara Komitatkunsido kaj multaj aliaj gravaj farendaĵoj.

**Sekcioj**

Diligente survojas la esplorkontaktoj kun la sekcioj de ILEI. Gvidas tiun laboron la estrarano pri Sekcia agado Marija Jerković kunlabore kun profesoro Renato Corsetti. Jam okazis kontaktoj kun 42 sekcioj kaj estis ricevita grava informaro.

La svisa ILEI-Sekcio proponas seminarion 2022/09/10 aldone al la StudSabato kutima, 16/00-17/30 UTC+2 en CDELI, Svislando. La temo estos “Ĉu korekti, kiel korekti?” Ne temos nur pri korektado fariata de instruisto, sed ankaŭ pri kongresaj situacioj, kiam iu aŭdas eraron ĉe alia persono kaj pripensas: ĉu mi diru ion? Prelegos Mireille Grosjean, lingvoinstruistino kaj eksprezidanto de ILEI kun ebla kontribuo de Monika Molnar.

**Kapabligo**

Kiel kutime, nia samideanino Marija Belošević organizas la Tagon de Lernado dum la UK en Montrealo. Ĝi okazos la 9-an de aŭgusto 2022 kun la temo ‘Instruado de Esperanto laŭ diversaj lingvoj, kulturoj kaj regionoj’ kaj la subtemo: ’Pandemiaj spertoj kaj postpandemiaj tendencoj en instruado’ Finiĝis la kurso de Esperanto en la Universitato Espero, UEC, DR Kongo gvide de Fransoazo Noireau. La Estraro dum sia kunsido aprobis, kiel helpi en la organizado de la ekzamenoj por la finintoj.

**Premio La Torre**

La gajninto de Premio La Torre 2022 estas Nitta Takamichi el Japanio. La titolo de la esploro estas “Instrumetodo por Esperanto-kurso bazita sur metakognado kaj aktiva lernado”. Legu la finan raporton de la internacia ĵurio el ses landoj: https://www.ilei.info/novajxoj/Raporto-pri-la-jxuria-kunsido-de-Premio-La-Torre-2022.pdf

La ceremonio por la premio okazis dum VEKI-3 (la 3-a Virtuala Kongreso de ILEI), kun prelego de Renato Corsetti pri la karmemora profesoro Maŭro La Torre kaj kun la ĉeesto de la reprezentantoj de familio La Torre kaj de la internacia ĵurio, kiu konsistis el famaj fakuloj: Ahmad Reza Mamduhi, Renato Corsetti, Xiao-feng GONG (Arko), Elisée Byelongo, Giridhar Rao, Dennis Keefe kaj Alessandra Madella.




**Internacia Pedagogia Revuo (IPR)**

La redaktoro Jozefo Nemeth kun la skipo diligente preparas la ĉefan organon de ILEI.

**ILEI en la Reto**

Regule publikiĝas utilaj informoj pri ILEI en ĝiaj retejo kaj sociaj kanaloj kaj grupoj.

**Kun UEA**

La vicprezidanto Alessandra Madella preparis koloran tri-lingvan varbilon pri ILEI (esperanta/angla/franca) por la UK en Kanado kaj por la IJK en Nederlando. Suzanne Roy deĵoros ĉe la budo de ILEI dum la UK en Montrealo. Du italaj junuloj Diego lo Testo kaj Giovanni de Lucia deĵoros ĉe nia budo de ILEI dum la movada foiro de TEJO.

**Dankoj**
Ĉiuj personoj, kiuj iom iel kontribuas al la mastrumado kaj vivo de la Ligo, ricevu niajn elkorajn dankojn!

Sekretario de ILEI:, Elena Nadikova, Prezidanto de ILEI:: Ahmad Reza Mamduhi, 2022-07-15

# Aliĝoj por UK bele kreskis, jen ondo da informoj

Danke al 135 novaj aliĝoj, registritaj dum du semajnoj ekde la 30a de junio ĝis la 13a de julio, la nombro da aliĝintoj al la 107a Universala Kongreso de Esperanto, kiu komenciĝos la 6an de aŭgusto en Montrealo, kreskis ĝis 745 kaj superis la postmilitan malrekordon de UK-99 en Bonaero (2014) kun nur 706 aliĝintoj. Legu pli en la novaĵretejo "La Ondo de Esperanto" https://sezonoj.ru/2022/07/montrealo-25/

# ILEI aŭdigos sian voĉon en internacia konferenco

La vicprezidantino de ILEI, Alessandra Madella, prelegos en ĉi tiu scienca konferenco: https://www.aalawebsite.com/conference-2022 en Ĉenajo, Barato, pri la ekzamena agado pri Esperanto en Italio.

# Sukcese debutis la retaj KER-ekzamenoj

Komence de julio 2022 finiĝis tre grava laborperiodo de la redaktoro de nia paĝaro. Katalin Kováts, estro de la KER-Ekzamena Centro (KER-EC) kun sia teamo dum la unuaj ses monatoj de la jaro okupiĝis pri la restartigo de la ekzamensistemo de UEA, testante la novan nivelon C2, kreante la teknikajn bazojn de la retaj ekzamenoj kaj organizante la unuajn retajn ekzamenojn. Ni raportas pri junio; okazis ekzamenoj je la noveloj C1, B2 kaj B1. La ekzamenojn partoprenis entute 83 personoj el 30 landoj (krom el Afriko, el ĉiuj kontinentoj). Legu pli: https://edukado.net/novajhoj?id=873

# La Kongresa Libro 2022

La Kongresa Libro (KL) estas tradicia presaĵo de la Universala Kongreso de Esperanto (UK), kiu ankaŭ inspiras aliajn Esperanto-eventojn. Krom gravaj salutmesaĝoj kaj aldonaj informoj al tiuj antaŭe aperintaj en la Dua Bulteno, ĝi entenas la programon de la UK, kaj per ĝi kongresanoj povas organizi kiel ili planas ĝui la kongreson. Normale la Kongresa Libro haveblas nur papere kaj kongresanoj ĝin ekhavas nur surloke, registrante sin ĉe la akceptejo kaj prenante sian kongresan sakon.

En 2022 la Kongresa Fako de UEA, nuntempe ĉefreprezentata de la triopo Dorota Rodzianko, Sonja Zaretskaia kaj Petro Baláž, proponas du novaĵojn. Post pretigo de la presata Kongresa Libro (al kiu enorme kontribuis la Loka Kongresa Komitato/LKK, la Estraro de UEA kaj aliaj kolegoj – ne nur en UEA, sed ankaŭ en E@I), la Kongresa Fako preparis por ni ankaŭ la ciferecan Kongresan Libron, version publike konsulteblan en du formatoj (kiel PDF, por elŝuto, aŭ por foliumo): uea.org/kongresoj/UK.

En la Kongresa Libro de la 107-a UK vi trovas la salutmesaĝojn de la Alta Protektanto kaj de la Urbestrino de Montrealo; la konsiston de la Honora Komitato de la UK, Estraro de UEA, Centra Oficejo, Kongresa Fako, LKK; utilajn informojn pri Montrealo, la kongresejo, la kongresaj salonoj kaj la UK-funkciado; la programo, laŭtage, tabele kaj laŭalfabeta listo de programeroj. Ĉi-jare unuafoje funkcios la "**Kongresa Apo**" (KA), per kiu kongresanoj kaj la publiko povas per sia poŝtelefono kaj retumile konsulti la programon, marki siajn deziratajn partopreneblojn, kontroli mapojn kaj anoncojn, vidi la liston de partoprenantoj kaj kun ili babili! Temas pri bonvena akiraĵo por la UK, alirebla ĉe <uk2022.glideapp.io>(por aliri necesas informi retpoŝtadreson, al kiu estos sendata alirkodon - se ĝi ne alvenas en vian enirkeston, kontrolu ankaŭ vian spamujon).

## Ĉu vi ŝatus videbligi vian organizon dum #IJK2022?

La Junulara Movada Foiro okazos unuafoje kun la reveno de la ĉeesta IJK en Nederlando! Montru vian organizon, varbu novajn membrojn kaj kunlaborantojn, aŭ ekkonu aliajn la 22-an de aŭgusto, ekde la 16:00. La foiro estas malfermita al ĉiuj organizoj, kun prioritato al landaj kaj fakaj sekcioj de TEJO. Ĉiuj, kiuj ŝatus peti propran tablon, plenigu la aliĝilon ĉe bit.ly/JMF-2022. Limdato: la 6-an de aŭgusto 2022

Eble de Didier Janot




#IJK2022 okazos en Nederlando, proksime de Eindhoven. La organizantoj Roĉjo kaj Joost montras al ni la belegan kongresejon. Ĝi estas tre spaca kaj eĉ havas naĝlageton kaj privatan plaĝon. Mojose, ĉu ne? 💚

SMG aldonas tekston el la retejo de la kongreso kune kun la jena bildo pri la IJK, kune kun amuza foto de organizanto Rojĉjo, kiu ŝajne ĵus vidis la fantomon de la patro de Zamenhof.

========= vortoj: 2020 =========

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj. Ni pardonpetas pro la longo, sed alvenis 16 paĝoj da kandidataj materialoj! Ni promesas ne plue krei 6-paĝajn gigantojn.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis majo 2022 (per EKO 2022-25). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.